

# NOVA SENTO

ESPERANTA  
GAZETO DE  
BILBAO

ORGANO : DE : LA  
VASKA : ESPERAN  
TISIAKO



APERAS ĈIUMONATE

2.<sup>a</sup> Jaro    ◆    ◆    ◆    Numero 17.<sup>a</sup>

NOVEMBRO 1910<sup>a</sup>

## ENHAVO

Gazetoj esperantistaj. — Intersangantaj kun «Nova Sento»  
El komikajhoj de homa vivado. — (Rakonto de Sprita Mu-  
sheto). — HELENA HEMPEL.  
La «Miserere» — (Katolika religia kanto). — VICTOR O,  
DE ALLENDE.  
Fluganta kanto. — JOSÉ VENTURA.  
Malalta filozofio. — (Daurigo). — J. ECHEVARRIA.  
For de mia patrujo. — FELIKSO DIEZ.  
Infana dimanĉo. — (Daurigo) — WILHELM PLANKERT.  
Bibliografio.  
Diversaj sciigoj.  
Veroj kaj mensogoj.  
Anoncoj

UNU NUMERO 0,15 PTOJN.

REDAKCIO &

ADMINISTRACIO

STRATO JARDINES, 7

BILBAO (Hispanujo)



## Gazetoj esperantistaj

### INTERŜANGANTA, KUN "NOVA SENTO"

#### I.—ESPECIALAJ JURNALOJ

*Internacia Scienca Revuo*, Revuo monata, Kötzschenbroda Dresden (Germ.) H. F. Adolf Thalwitzer. Jare, Fr. 7.—(2 S 750 s.)

*Internacia Socia Revuo*, duonmonata. Administracio: Kepplers'tr 170 Hago (Holanda); jare, Fr. 3,50 (duonjare Fr. 2).—1,40 Sm.

*Juna Esperantisto*, monata; por junuloj, intruistoj kaj Esperanto lernantoj, de: Adm.: 33, rue Lacèpède, Paris; jare, Fr. 2,50.—1 Sm.

*La Duonmonata*, por la vivo de la Esperantistoj sur ĉiuj kampoj de la homa spirito; de Johannes Heyn, Thomasring 6, Leipzig, Germanujo; jare Fr. 4,45.—1,75 Sm.

*La Revuo*, internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de D<sup>ro</sup>. L. Zamenhof; ĉe Hachette kaj K<sup>o</sup>, 79, Bd St Germain, Paris, kaj ĝiaj korespondantoj; jare (Francujo) Fr. 6, (eksterfrancujo) Fr. 7.—2,75 Sm.

*La Simbolo*, monata internacia gazeto; ĉe Symbol Publishing C<sup>o</sup>, post ofico Box, 1020, Tacoma (Wash.) Usono; jare (en Usono Sm. 2).—2,50 Sm.

*La Spritulo*, internacia gazeto por ŝerco, humoro kaj satiro; de Richard Bresch, Körnerstrato 31, p., Leipzig (Allemagne); jare, Mk. 2,50.—1,20 Sm.

*Libera Penso*, monata bulleno de Internacia Societo de Liberpensuloj; ĉe S<sup>o</sup> Deshays, Sens, Francujo; jare, Fr. 2,50—1 Sm.

*Lingvo Internacia*, monata organo, 48 paĝoj (13×20); jare, Fr. 5. Administracio: Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacèpède, Paris.—2 Sm.

*Oficiala Gazeto Esperantista*, organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj; ĉe Centra Oficejo, 31, rue de Clichy, Paris; jare, Fr. 5.—2 Sm.

*Voĉo de Kuracistoj*, monata organo por internacia korespondado de kuracistoj ĉe D. Stefan Mjkolajski, strato Sniadeckich 6, Lwow, Galicio (Aŭstrio); jare Kr. 3,60.—1,50 Sm.

#### II.—NACIAJ PROPAGANDA

AŬSTRALIO: *La Aŭstralia* V. S-ro G. Collingridge Hornsby N. Aŭstralia.

*The Aŭstralian Esperantist*, mona D<sup>o</sup> A. E. Barrington Bejalla Esperanto C. Bridge; St Benalla (Victoria); jare 1 Sm.

AŬSTRIO: *Aŭstria Esperantisto*, monata, por la ligo de gsrmanlingvaj aŭstria grupoj es.: ĉe Adm. Schüttesteir 91/15 Wien II/15, Kr. 3.—1,25 Sm.

BOHEMUJO: *Časopis Českych Esperantistů*, kun literatura aldono oficiala monata organo de Cenfra Asocio «B. U. E.» Red.: F. Kühn, Praha II 2023; jare (en Bohemujo, K. 3), Dittrichora ul 7.—1,50 Sm.

*Bohema Esperantisto*, monata organo de «Bohema Asocio Esperantista.» Red. kaj Adm.: Kampa 405, Praha III (Bohemujo Aŭstrio); jare 1,70 Sm.

ĈILO: *La du Steloj*, monata organo de la «Ĉ. E. A.»; ĉe Ĉila Esperantista Asocio, Santiago de Chile (casilla 728).

FRANCUJO: *Juneco*, oficiala organo de la Franca kaj Angla Federacioj de la Junaj Esperantistoj. Direktanto: Ferdinand Duviard, 152, Boulevard Raspail, Paris; jare, F. 4 (por Federacianoj: Fr. 3).—1,60 Sm.

*L' Esperantiste Catholique illustré*, mon. (France kaj Esperante); ĉe Office Espérantiste Catholique, 10, rue Béranger, Paris; jare, Fr. 2,50.—1,20 Sm.

*Paris-Esperanto*, monata organo de l' Grupo Pariza, en franca kaj esp. lingvo. Sek.: V. Chaussegros, 3, Place Jussieu, Paris; jare, Fr. 1,50.—0,60 Sm.

*Le Monde Esperantiste*, monata 3 rue Sophie Germain, Paris, Fr. 2.—0,80 Sm.

*Norda Gazeto*, bul. mensuel de la Féd. des Groupes Espér. du Nord de la France. Adm.: E. Deligny, Boul. Vauban, Saint-Omer; jare, Fr. 1.—0,40 Sm.

*Normanda Stelo*, monata organo de la Grupo Esp. de Rouen. Red.: S<sup>o</sup> M. Liebard, 41, rue de la Vicomti, Rouen; jare. Fr. 2,50.—1 Sm.

*Sarta Stelo*, monata gazeto de l' Esperanta Grupo en Le Mans (Sarthe); ĉe S<sup>o</sup> Lepeltier, 14, rue Scarron, Le Mans; jare, Fr. 1.—0,40 Sm.

*Germana Esperanto Gazeto*, organo de la *Daurigas en la aŭtaŭlasta paĝo.*

## EL KOMIKAĴOJ DE HOMA VIVADO

(RAKONTO DE SPRITA MUŜETO)

Mi estis iam dupieda unutagulino—el speco de tiuj, kiuj amas frandaĵojn, ĉampanon, belajn vestaĵetojn kaj al ili similajn—senkulpaĵojn. Sed la sorĉforto de l' metempsiĥozo aliformigis min en duflugilan zumantan estaĵon,—en tian ordinaran, grizan ĉambran muŝeton, kiu en-sorbas la vapormiasmojn de homoj kaj sin nutras per deĵetpecoj de iliaj manĝaĵoj.

Brrr!.. ŝarĝa pentopuno pro pekoj de mallonga vivado! Por ĝin interrompi, mi povus ektrinki muŝvenenon, starigatan en homaj loĝejoj—sed tion mi ne faros, sciante teorie, ke ĝi kaŭzas terurajn dolorojn. Mi evitas ankaŭ araneaĵajn retojn, ĉar la ventruloj, kiuj tie sidas, ĉiam viglante, tiel al mi rememorigas la dumanajn araneoĵojn, kiujn mi sufiĉe ekobservis dum mia estinta vivo, ke pro nenio en mondo, mi volus enfali en manegojn de iu ajn el ili. Mi ne lasos min ankaŭ kapti de l' homa mano, petole balancanta en aĉro, ĉar la timemo, propra al mia muŝa naturo, igas min ekflugadi supren, ĉiufoje, kiam mia centokula rigardo ekrimarkas plej malgrandan danĝeraĵon.

Tiu senĉesa timduobleco: je vivo kaj je morto, fariĝis por mi neelportebla turmento; nun mi nur rekonis, kiel multpeza estas tia pentopuno por la pli nobla parteto de l' esto, forŝirita el ĝia propra ingo kaj enkorpigita en organismon tiel malbonspecan kaj pereeman!

Mi supozis ke almenaŭ mia kvaranteno daŭros nur dum la someraj monatoj—kiel ordinara tempspaco difinita por ekzistado de miaj sespiedaj kolegininoj—sed pasis aŭtuno, mi vidis multajn centojn da miaj fratinoj, forfalantaj de l' muroj kun mortrigidaj piedetoj—kaj mi ĝis nun, ne povas atingi liberigon de mia pentopuno. Per iu miraklo, mi restas vivanta, kiel memsola ŝippereulo enuanta sur senhoma insulo.

Nun estas vintro. La loĝejo en kiu, la sorto ordonis min estadi, apartenas al sinjorino F. vidvino de iu juĝkonsilano. Kvankam daŭras ekstere frostoj, ĉi tie estas varme. Mi traflugas la ĉambrojn—de salono mi pasas en manĝoĉambron, en dormejon, en kuirejon k. t. p.

Entute, ĝi estas ĉiam—mallibereco... tede kaj enuo. Ĉar tio, kion mi vidas kaj aŭdas, ne-

niel estas interesa. Ho, kiujn naŭzojn ĝi eĉ al mi kaŭzas!

Mi dividos kun vi la impresojn, kiujn mi spertis hieraŭ, t. e. merkrede.

La merkredoj estas akcepttagoj ĉe sinjorino F. sed nur por unu el rondoj de ŝiaj gekonatumuloj: por la plej konfidindaj, kiuj kunvenas ĉi tie, ne pro iaj gravaj konferencoj, ne por vista aŭ taroka kartludo, eĉ ne por la «mizerkompata» interparolado pri infirmecoj kaj peketoj de l' proksimuloj, kiun oni praktikas tiel oportune ĉe amiksocieta tetrinkado;—ne, la instigilo, kiu kunvenigas tiujn personaĵojn estas—la danclernado.

Ternas nome pri tiuj modernaj dancoj kiuj aperas en salonoj, kiam oni jam estas en tutplena disvolvo de l' aĝo—mi dirus eĉ, en templimo, kiam la suno de l' vivo, komencas de l' tagmeza zenito, malrapide kaj nerimarkeble, iom post iom, iradi malsupren. Tiam, kiel ankaŭ en la naturo, la varmego estas plej intensa, la deziro ĝui pasis ĝis plej alta grado.

La diskreteco inter tiuj rondanoj havas eminentan gravecon; ĝi estas la ĉeneto, kiu kun-kroĉas tiujn elektitulojn. Feliĉsenta estas la certigo, ke oni sprite aranĝis la elekton!

Post reciprokaj salutoj kaj rapida sed esploranta revuo de vizaĝoj kaj ornamvestoj (en societoj eĉ plej intimaj, tiaspeca kontrolo apartenas al praktikaj nepraĵoj)—komencas stereotipa vortinterŝanĝo; diskutataj estas la impresoj el balo, premiero, koncerto, glitumado k. t. p. Poste la parolado pasas al danctemo.

—Kiel ni sukcesos hodiaŭ en la «bostono?»—Ĉu en la «gavoto», vi ne trovas sinjoro, iom da arĥaismo?—Kaj kion vi konsideras rilate la «minjon?»...

Mi eksentis naŭzojn pro odoro de parfumaj aĵoj, precipe de «azureo». Mi malamas la bonodorojn de tiu speco. Eĉ kiam mi estis ankoraŭ virinseksa homa estaĵo, mi neniam uzadis parfumodoraĵojn, tiel forte frapantajn la flarorganon,—tiom pli, kiam mi sciigis, ke ilian plej grandan parton, pro manko de sufiĉa kvanto de kreskajaj elementoj, oni preparas ĥemie el tiaj substancoj, kiel ekzemple la ostoj de l' rato (ne ridu, ĝi estas fakto!)

Mi do rapidflugis sur lampkloŝon, kiu ŝajnis al mi bona observadloko kaj mi komencis studadi la mienojn kaj movojn de l' alvenintoj, revante, ke hodiaŭ mi eble ne estos tiom

enuigata kiom ĉiufoje ĝis nun (mi trompis min, kiel vi vidos en la daŭrigo de mia rakonto).

—Nia dancmajstro ne estas ankoraŭ—rimarkas sinjorino F. edzino de l' riĉa veturilfabrikanto—ĉu li do hodiaŭ malfruigos?

La fortepianludisto jam ektuŝis la klaviaron per kelkaj preludoj, la okuloj de l' gastaro direktiĝas sur horloĝan ciferplaton—sed jen, en salonon ensaltas kun salutadoj, Sro. L. la majstro de dancinstruado.

—Ŝajnas, ke mi vin ne atendigis, gesinjoroj, pli longe, ol unu minuteton, sed pro tio ĉi mi petas ankaŭ pardonon, senkulpigu min—ripetas li kunfrotante la manojn.—Jen, ni estas en kompleto, —li aldonas, farante revuon de l' ĉeestantoj—ni povas komenci. Mi petas, stariĝu en paroj. La saman vicordon ni observos, kiel lastafoje. Ni do komencu: sinjorinoj, sinjoroj!

Eksonoris la silkmelodiaj tonoj de «minjon». Sro. L. trakuras per okuloj la ordiĝintajn parojn, kiel la militistestro siajn skadrojn, antaŭ la komenco de l' batalo. Li donas signon, la dancantoj kaj dancantinoj ekmovigas siajn figurojn, ĉiu kun plejpovebla, ekstudita gracio.

Apud F<sup>ino</sup> Alenjo, filino de l' dommastrino, forta nigrharulino, proksimiĝanta al jartrideko, stariĝis iu grava grizethara inĝeniero D. kun mallonge ĉirkaŭtondita kapo. En sekvanta paro dancas unu jam troe disvolvita, anemia F<sup>ino</sup> B. kun iu malaltkreska, diketa doktoro. Plue oni vidas S<sup>ino</sup> T. kun formoj tre plenrondaj kaj movoj de kaprica katino; ŝi havas por kundancanto, ruĝetharan advokaton kun malgranda senharaĵo kaj ora nazumo. Kvara paro konsistas el vigla sed eta profesoredzino H. kies edzo, kiel cetere ĉiam kaj ĉie, akompanas ŝin ankaŭ ĉi tie en danco. Lia nigriĝita barbeto moviĝas laŭ la muziktakto kaj la palpebrumantajn okuletojn li mallevigas senĉese sur la brilajn finajpintojn de l' pantofletoj de sia edzino, kiel al ili parolante. Ĉu li pritraktas kun ili iaajn paktojn?... Mi havis tenton malsuprenflugi ĝis lia orelo, por komuniki al li iaajn el miaj vivspertaĵoj, sed mankis al mi kuraĝo, rilate lian profesoran rangon.

—Bonvolu do gesinjoroj, pli profunde kliniĝi flanken! mi ĉiam je ĝi petegas kaj plej ofte vane! —krias ĝentile sed duonmalpacience Sro. L. kaj alkurinte al F<sup>ino</sup> konsilanfilino, kiu okupita per interparolado kun la inĝeniero,

ŝovigas piedojn preskaŭ senpense,—li krias kun haltigata incito:

—Vere, ni interkoleriĝos, F<sup>ino</sup> Aleksandrino, mi ja petas vin tiel insiste, je pli granda movelasteco... *plus de douce nonchalance!*... Jes, jes, ankoraŭ pli profunde! —li diras, vidante la provon, kiun faras F<sup>ino</sup> F. —Vi ridas, sed vere, mi ne ŝercas; *cela donne donc du charme...*

Oni devas aldoni, ke tute kontentigi la majstron estus tro malfacile al F<sup>ino</sup> Alenjo, kiu nur antaŭ unu jaro seniĝis de longa korseto, tiu malamiko de figurflekseco kaj gracio, formiganta jam de infanaĝo, la virinajn brustkaĝojn, je rigidaj manekinoj. Cetere, jam nature, malmulte movema, ŝi ne povas sen penego, konforme fleksiĝi. Kun ioma malkontento, ŝi murmuretas al sia kundancanto:

—Ho, se ne estus tia la volo de patrinjo, mi neniam partoprenus en tiuj lecionoj!

—Ĉu vi troe de ni ne postulas, Sro. dancmajstro? —intermetas de sia flanko, kun ia indigno, la serioza inĝeniero, kiun unufoje en lia vivo, trafis la bezono gimnastiki tiel akrobate.

Sro L. volas nenium malkontentigi. Li murmuretas mallaŭte al la gravplena paro:

—Volu scii gesinjoroj, ke nur dum la lernado estas nepraj tiel elastaj movoj; en danco mem ili estos modifitaj —*mais à présent, c' est absolu, c' est absolu, croyez-moi,*—por elkrei malrigidecon.

—Vi faras malsufiĉe koketajn okulojn,—admonas li unu paŝon plue, la palan, apatian F<sup>ino</sup> B. —Rigardu do, kiel mi ĝin efektivigas—kaj proksimiĝante binoklojn al okuloj, li kuntiras la palpebrojn, fleksas la kolon kaj formigas la lipojn en elegantan rideton.—En gestoj viaj, F<sup>ino</sup>, devas ankaŭ troviĝi pli da movemeco. Vidu jen, kiel mi ĝin faros!

F<sup>ino</sup> B. penas lin imiti, sed la ondado de ŝia talio rememorigas la movmanieron de l' skorpiono, ŝajnanta eligi el sia ingo...

La majstro trakuras al tria paro. Tie ĉi li vidas, ke S<sup>ino</sup> T. faras jam ŝi mem sufiĉajn penadojn, por precizigi forte la balancigadon. Ŝia busto, kiel ankaŭ la femuroj, ŝancelegas, kvazaŭ balono antaŭ sia suprenflugo. En ŝia palverda, silka korsajo, aŭdiĝas momente facila krakbrueto, kvazaŭ de elektra fajrero forkuranta el voltmaŝino. Sro advokato diskrete flankiĝas, kiel timante tro fortan eksvingon.

Sro L. trapasante, fleksigas unu el liaj brakoj, kiu ŝajnas al li iom senelasta kaj forpaŝas plue. Gesinjoroj H. ricevas ankaŭ kelkajn rapidetajn rimarkojn—poste oni aŭdas pli laŭtan komandon:

—Ni ne perdu tempon!—Ripetu de l' komenco, tamen vi volu rememori afable gesinjoroj, pri miaj proponoj!

La muziko aŭdiĝas denove, la majstro per brua manekbato, donas komencsignalon, la gedancantoj kun serpentaj gestoj, kun kapbalancado kaj kunpremitaj buŝoj, ree fluŝoviĝas tra salono...

Iu ekkrius: *Ô charme, ô charme!* bela estas la vivo!... Al mi tamen fariĝis iom sufoke, jam ne nur pro parfumaĵoj, sed ankaŭ pro aliaj nedifinitaj odoroj, pro ĝemado de pianino kaj ventblovo devenanta de dancado. Turniĝo ekkaptis mian mizeran kapeton; mi forflugis, intencante sidigi dume sur kadron de l' spegulego. Sed rimarkinte de malproksime lakeon portantan al manĝotablo, fragan kremajon, mi sekvis lin rapide kaj tuj poste, sidiginte sur randon de l' plado, mi komencis per maldika langeto, ensorbadi ĝis eksatiĝo, fluidan, bonodoran dolĉaĵon. Ĝi rememorigis al mi la momentojn de mia antaŭa ekzistado, iajn ĝuindajn somerekskursojn en arbaro...

Subite—mi flugasaltis.

—Forkaptu ilin ĥolero!—mi ekaŭdis mal-laŭtigitan ekkriion de l' nudpieda Franjo (ĝi estas knabino dungata pro servadhelpo, en dancaj fikstagaj ĉe la konsilanvidvino) trakuranta la antaŭĉambron.—Ili grimacas per buŝoj, kiel se ili estus trinkintaj acidaĵoj kaj tordiĝas per korptrunkoj, kvazaŭ raŭpoj en formikaro. Ĉu iu vidis ion similan! Tfu!

Tiu ĉi intermezo elektrizis min. Forlasis min naŭzojn,—mi flugas gaje post Franjo, kiu finigante sian monologon en la kuirejporde, ŝanĝas ĝin en apostrofon, turnitan al lakeo kaj kuiristino—kaj tiuj ĉi respondas ŝin per laŭtarideksplodo.

Kvankam en la kuirejo ne odoris parfumoj, ne aŭdiĝis muziko, franca parolado nek susuro de silkaj vestoj,—kaj eble ĵus pro ĉi ĉio,—fariĝis al mi iom pli agrable. Lavante de kremajo mian buŝeton, per vilaj piedetoj kaj glatante per ili flugilojn, mi aŭskultis ankoraŭ la finan paroladon de l' kuireja personaro, pri la dancantoj, sed kvankam ĝi estis ridinda kaj eĉ

amuzanta, ĝi min jam ne ekgajigis. Mi ekmeditis...

Alkroĉiĝinte fine al angula muro super la forno, mi pretiĝis al dormado—dezirante al mi mem, ke ĝi jam estu la lasta...

Tamen, tiun ĉi matenon mi vekigis ankoraŭ... ĉu por longtempe?...

Originale verkita de  
HELENA HEMPEL  
(El Poluĵo).

## LA "MISESERE"

(KATOLIKA RELIGIA KANTO)

Antaŭ kelkaj monatoj, vizitante la famkonatan abatejon de Fitero kaj dismovante kelkajn volumojn el ĝia forlasita biblioteko, mi eltrovis en unu el ĝiaj anguloj du aŭ tri kajerojn de muziko sufiĉe antikvaj kaj eĉ ekmusmorditaj.

Tio estis «Miserere».

Mi nescias muzikon; sed ĝi tiel allogas min ke eĉ ne ĝin komprenante, kelka foje mi prenas la partituron de opero, kaj mi pasigas horojn, okulante ĝiajn paĝojn, rigardante la arojn da kantnotoj pli malpli densamasigitaj, la liniojn, la duoncirklojn, la triangulojn kaj la aliajn diversajn signojn, nenion komprenante, nenion profitante.

Konsekvence kun mia manio, mi ekzamenis la kajerojn, kaj tio, kio unue atentigis min, estis ke kvankam en la lasta paĝo estis latina vorto, «finis», tiel vulgara en ĉiuj komponaĵoj, la Miserere ne estis finita, ĉar la muziko atingis nur la dekduan verseton.

Poste mi trarigardis la foliojn kaj pli strangiĝis al mi rimarki ke anstataŭ la italaj vortoj uzataj en ĉiuj komponaĵoj kiel maestoso, allegro, ritardando k. t. p. estis linioj skribitaj per literoj tre malgrandaj kaj germane verkitaj, el kiuj kelkaj servis por averti aĵojn tiel malfacile fareblajn kiel la jenajn:

*Krakas... krakas la ostoj, kaj devas ŝajni ke el iliaj medoloj eliras kriegoj. «La kordo boyas sen malakordiĝo.» «La metalo tondras sen surdiĝo; tial ĉio sonas kaj oni ne konfuzas ion, kaj ĉio estas la homaro kiu kriploras kaj ĝemas. La plej originala el ĉiuj frazoj estis sendube tiun rekomenditan en la lasta verseto: La muziknotoj estas*

*ostoj volvitaj de karno; fajro nee-tingebla, la ĉielo haj ĝia harmonio... ĵorto!... ĵorto kaj dolĉeco.*

Ĉu vi scias kio estas ĉi tio? mi demandis maljunuleton kiu akompanis min kiam mi duontraĵukis ĉi tiujn liniojn, kiuj ŝajnis frazojn skribitajn de frenezulo.

La maljunulo al mi raportis tiam la legendon kiun mi reraportos al vi.

Antaŭ multaj jaroj, dum nokto pluvema kaj malluma, alvenis al la klaŭstra pordo de ĉi tiu abatejo pilgrimanto, kaj petis iom da fajro por sekigi siajn vestojn, pecon da pano por satigi sin, kaj kiun ajn ŝirmejon por atendi la ektagigon kaj daŭrigi sian vojon. Sian modestan loĝejon, sian malkomfortan liton kaj sian bruligitan fajrujon proponis la nepastra monaĥo al la veninto, kiun, post la senlacigado, demandis pri la celo de lia pilgrimado kaj kien li pilgrimadis.

—Mi estas muzikisto, respondis la demandato, naskiĝis tre malproksime de ĉi tie, kaj foje ĝuis en mia lando famon. Dum mia juneco mi faris el mia arto potencan delogilon, kaj bruligis per ĝi pasiojn kiuj fortrenis min al krimo. En mia maljuneco mi volas konduki al bono la kapablojn kiujn mi uzis por la malbono, celante savi min per tio kio povis min kondamni.

La enigmaj vortoj de la nekonato ne ŝajnis tute klaraj al la nepastra monaĥo, en kiu la scivolo ekvekiĝis, kaj instigata de li daŭrigis la pilgrimanto tiel:

—Ploris mi tutanime la kulpon faritan de mi; sed por peti al Dio misrikordion (kompaton) mi ne trovis taŭgajn vortojn por esprimi inde mian penton, ĝis iu tago kiam miaj okuloj hazarde fiksitis sin sur sanktan libron. Mi malfermis tiun libron, kaj en unu el iliaj paĝoj mi trovis gigantan krion de pentpeton veran, psalmon de Davido kiu komencas ĵMiserere Mei, Domine! De la momento kiam mi legis ĝiajn strofojn, mia unika penso estis trovi muzikan formon, tiel belegan, ke ĝi sufiĉus enhavi la grandegan himnon de doloro de la Reĝo Profeto. Ankoraŭ mi ne ĝin trovis; sed se mi sukcesus esprimi kion mi sentas en mia koro, kion mi konfuze aŭdas en mia kapo, mi estas certa ke mi farus Miserere-on tiel mirindan, ke aliansimilan ne estas aŭdintaj la naskiĝintoj, tiel malĝojegan ke kiam la cefanĝeloj aŭskultus la unuan akordon dirus kun mi, kovritaj la okuloj de larmoj kaj aldirektante sin al la

Sinjoro ĵMiserikordio! kaj la Sinjoro ĝin havus por ĉi tiu Lia Kreitaĵo.

La pilgrimanto, en ĉi tiu okazo de sia raporto, silentis momenton, kaj poste, eligante sopiron, daŭrigis sian parolon. La nepastra monaĥo, kelkaj subuloj de la abatejo kaj du aŭ tri paŝtistoj de la monaĥa kampodomo, kiuj cirkaŭis la fajrujon, silentege aŭskultis lin. Li daŭrigis:

—Mi trairis la tutan Germanujon, la tutan Italujon, kaj la plej grandan parton de ĉi tiu lando klasika por la religia muziko, kaj ankoraŭ mi ne aŭdis eĉ unu, eĉ unu Miserere-on per kiu mi povu min inspiri, kaj mi aŭdis multege de ili.

—Ĉiujn? diris tiam, interrompante lin, unu el la brutgardistoj: Mi estas certa ke vi ankoraŭ ne aŭdis la Miserere-on de la Montego.

—ĵLa Miserere-on de la Montego! ekkriis la muzikisto kun mira mieno ĵkiu Miserere estas tiu?

—Ĉu mi ne ĝin certigis? murmuris la kampulo; kaj poste li daŭrigis per mistera tono: Tiu Miserere, kiun nur aŭdas hazarde kiuj, kiel mi, iras tage kaj nokte al la brutaro tra la montoj kaj ŝtonegoj, ĝi estas tute historio, historio tre antikva, sed tiel vera kiel ŝajne nekredeinda.

Estas la okazo; ke en la plej akra krutaĵo de tiuj barieroj de montoj kiuj limigas la horizonton de la valo, en kies fundo estas la abatejo, estis antaŭ jam multaj jaroj ĵkion mi diras! antaŭ multaj jarcentoj, famkonata monaĥejo, kies monaĥejon, laŭ popola diro, konstruis sinjoro per la bienoj kiujn li devis heredigi filon kiun li senheredigis, kiel puno de liaj malbonaĵoj.

Ĝis ĉi tie ĉio iris bone; sed okazis ke ĉi tiu filo, kiu pro tio kion oni vidos poste, havis kvazaŭ diablan felon se li neestis la diablo mem, sciante ke siaj bienoj estis en la manoj de la religiuloj kaj ke lia kastelo estis aliformigita en preĝejo, kunigis kelkajn rabistojn, kunuloj siaj en la vivo de diboĉo kiun li entreprenis de post la forlaso de la patradomo, kaj nokton de ĵaŭdo Sankta, en kiu la monaĥoj estis en la ĥorejo, en la momento mem de la komenco de la «Miserere», ekbruligis la monaĥejon, forrabis la preĝejon, mortigis la monaĥojn lasante viva nenium.

De post ĉi tiu barbaraĵo, la banditoj kaj ilia

Sur la tablo en la loĝĉambro kuŝis la letero: «Al sinjoro Fr. Binder, onklo, Schillerstrato 31, loĝĉambro.» Dorse estis skribita: «Sendantoj Meto kaj Wernero Hartmann, de la ludĉambro». Kaj kiel oblato estis surgluita papereton, diranta: «Al neniu vidigu:»

La letero diras la jenon:

Amata onklo Frederiko:

Tial ke Wernero kaj mi ne vin vidis tuj kiam vi venos, ĉar ni estas en la preĝejo, mi volas memori vin, ke vi pretigu ĉiujn teatraĵojn. Ni jam scias niajn rolojn; Ilso ne tre bone. Eriko, tiu simio, ankaŭ ilin scias, ĉar li ĉiam aŭskultas, kiam ni provas niajn!

Korege salutas vin

Wernero kaj Meto

Post la diservo ni babilos kun vi.

Mi demetis la malgrandan Walteron kun mia horloĝo, lia gumpupo—nomata kriaĉulo—kaj multe da kusenbariloj en angulo de la kanapo kaj komencis tranĉi kartonon por la palisaro.

«Else havas kapdoloron» atentigis Anjo per ŝia plej dolĉa voĉo.

Tio ne estas miraklo, ĉar kiam mi ĝin rigardis, kuŝis la kapo tre malproksime de la trunko. Homoj en ĉi tiu restado ne kutimas havi kapdoloron.

«Sed Anjo, kial vi faros tion al via pupetol! Ĉu via patrino trenis vin iafaje je via kapo, kiel vi faras?»

«Ne, ĉar tiam mi ekkrius!»

«Do Else sendube ankaŭ ekkriis, ĉu ne?»

«Tute ne, ŝi estas tre ĝentila; neniam ŝi krias.»

«Sed nun ŝi do estas malviva.»

«Ne, onklo, ŝi ĵus diris, ke vi tuj rebonigu ŝin.»

«Ĉu vi do volas esti tute bona por ŝi?»

«Kompreneble!»

Per pinglo kaj fadeno mi revivigis la sinjorinon. Kiam mi finis, subite komencis en la vestiblo tondrobruado kaj kriado, el kiu klare mi aŭdis la vorton «Onklo». Poste enfalis la bando. Ĉapeloj, kantlibroj kaj manteloj ĉirkaŭflugis min; la malgranda Waltero forĵetis mian horloĝon; mi trapikis mian fingron, sed esprimi doloron mi ne povis, ĉar mi troviĝis en nedissirebla reto el brakoj. Mi vidis kvazaŭ tra vualo, ke Anjo je unu piedo ludis sovaĝan indianan dancon,

ke la malgranda Waltero ĵus traboris la barikadon kaj dangaris ruliĝi malsupren.

Mi eksaltis kaj ekskuis min, la tuta societo falis teren. Unue ili min rigardis mire kaj gratante la kapon, dum mi prenis Walteron ĉe miaj brakoj; poste ili komercis frenezan ridadon kaj kiel el unu buŝo ili ekkriis: «Tre bone! Tion ni faros alifoj!»

«Tion ni ne faros alifoj! Unue donu al mi ĝentile la manon kaj kison; due forportu la ĉapelojn kaj mantelojn kaj poste helpu al mi fari la kulisojn! Ĉu vi scias, kio estas kulisoj?»

Tion ili feliĉe ne sciis, tial ili rapide faris kion mi ordonis; poste ili ĉirkaŭis min atendantaj. Anjo sidigis sur seĝeto kaj provis, ĉu la kapo de Else estas sufiĉe firma.

«Kiam ni volas prezenti... teatraĵon, ni profitas la vestiblon... kvankam pli taŭga estus arbaro... sed, kio do okazas?»

Mi ricevis rippuŝojn alterne de Meto, Wernero kaj Ilso. Poste parolis Meto al mi ĉe orelo tiel mallaŭte, ke ĉiuj povis aŭdi ĝin!

«Onklo, tion do ne devas scii la aliaj!»

«Ha, tial! Tiam, Eriko, filo mia, iru do demandi al la servistino, ĉu la manĝaĵo jam estas preta. Vi ankaŭ povas helpi ŝin pretigi la tablon!»

La juna hometo min rigardis kun ekvido tiel, kiel li volus diri al mi: «Ne faru nur tiel; mi jam scias, ke vi volas ke mi forestu.» Sed la demando pri la manĝaĵo, kaj la rapidigo al tiu ĉi okupo tiel amata de li, lasis lin foriri pacience.—

«Bone, nun ni estas solaj.»

Mi komencis klarigi al ili la aferon, kaj ili tre diligente min helpis.—

Dume raportis Meto al mi siajn novajn planojn.

«Vidu, onklo, ni do volas presi la programon per nia presmaŝineteto, ĉu ne?»

Ĉiuj nun proponas kanti unue belan himnon.—

Post mallonga paŭzo Ilso demandis: «Onklo, kiu kuiras al vi la manĝaĵon?»

«Kuiristino.»

«Ĉu vi do ne havas edzinon?»

«Malfeliĉe ne.»

Ilso ĉagreniĝis pro tiu ĉi manko; poste ŝi opiniis energie:

«Vi devas havi edzinon!»

«Eble tio estus bona.»

«Edziĝu do kun nia patrino, ŝi bonege scias kuir!»

Meto kaj Wernerero malestime rigardis la malsaĝan fratinton.

«Jes, ŝi tre bone kuiras, sed via patrino estas mia fratino, kaj gefratoj neniam geedziĝas.»

El germana lingvo tradukis  
WILHELM PLANKERT.

*Daŭrigos).*

## BIBLIOGRAFIO

POR LA STUDENTOJ.—Ĵus aperis, el donita de la *Grenoble*'a grupo kun helpo de la Fakultato, universitata Gvidfolio, kiu klarigas la tutan organizon de la kursoj speciale starigitaj de 14 jaroj por la fremdaj studentoj dezirantaj akiri perfektanscion de la franca lingvo.

Plie ĝi montras ĉiujn allogaĵojn kiuj, almenaŭ tiom kiom la perfekta instruado, kunhelpis altiri al la ĉarma kaj pitoreska urbo «*Grenoble*» multajn fremdajn Studentojn (pli ol 1.100 la lastan jaron) inter kiuj jam kelkaj esperantistoj.

Ni esperas ke multaj petos tiun gvidfolion sendatan senpage de la Sekretario, Sro Roy 3, rue Anthoard Grenoble (France). Kaj tiel helpos varbi al nia afero la potencan societon kiu estas en Grenoble la Protekta Komitato por fremdaj studentoj.

**Dictionnaire complet Esperanto-Français**, par GROSJEAN MAUPIN, prof. agrégé de l'Université. 1 bela volumo bindita, 288 paĝa. *Librejo Hachette et Cie*, 79, boul, St Germain, Paris; prezo: Fr. 2.—

Tiu vortaro, kies aŭtoro povis profiti el ĉiuj antaŭaj laboroj, prezentas frukton el grandega kaj konsciencia penado, kaj estas, laŭ ĉiu ajn vidpunkto, malgraŭ la tre malgranda kaj tre oportuna poŝformato, la plej kompleta, la plej akurata, la plej preciza kaj la plej metoda el ĉiuj ĝis hodiaŭa tago aperintaj esperantaj vortaroj. Oni trovos en ĝi senescepte ĉiujn radikojn akceptitajn de Zamenhof, eĉ en siaj plej ĵusaj verkoj, el kiuj kelkaj troviĝas en neniuj aliaj vortaroj.

La aŭtoro diligente elkolektis ne nur el ĉiuj niaj naciaj aŭ specialaj vortaroj sed an-

kaŭ el ĉiuj ŝatindaj fontoj la novajn radikojn, kiuj ŝajnis al li aŭ necesaj, aŭ verŝajne aprobindaj aŭ simple provindaj. Li markis per specialaj respektivaj signoj la radikojn, formojn, signifojn aŭ uzojn, kiujn li juĝis malbone elektitaj kaj forĵetindaj aŭ dubaj kaj tiujn, kiuj apartenas al la teknika, belarta, poezia aŭ literatura lingvo. Dank' al la zorgema legado de la bonaj aŭtoroj kaj precipe de Zamenhof li povis prezenti en sia verko tre multajn kunmetitajn vortojn kaj interesajn esprimojn, kiuj mankas en la antaŭaj vortaroj. Li speciale turnis sian atenton kaj klopodon al la precizigo de la propra ekzakta senco de ĉiu vorto kaj de la diversaj eblaj signifoj de la plursencaj vortoj, ne kontentiĝante je supraĵaj kaj proksimumaj neplenaj tradukoj.

La Esperantistoj rajte plendas, ke ili ne malofte estas haltigitaj en siaj diversspecaj legadoj per vortoj, kies sencon ili ne povas trovi en la vortaroj, kiujn ili diskonas. Dank' al tiu kompleta vortaro, kiu resumas kaj plenigas la antaŭajn laborojn, la esperantistaro ne riskos plu tiun malagrablajn.

La verko estas antaŭita de majstra gravega antaŭparolo, en kiu la aŭtoro, kunigante kun sia speciala lingva kaj literatura kompetenteco la sendependan senpartiecon kaj la vastan, altan kvazaŭ superŝvenantan pensmanieron de vera filozofia spirito, pristudas kun malofta sincereco kaj klareco la gravan kaj esencan, sed malsimplan kaj malfacilan demandon pri la neologismoj.

Oni bezonas nur folii tiun vortaron por facile konvinkiĝi, ke ĝi estas, pro siaj kvalitoj same kiel pro sia eksterordinara mal-kareco, vera novaĵo en nia esperanta libroaro kaj oni povas aserti sen ia trograndigo, ke la akiro de tiu libro estas necesega al ĉiu serioza Esperantisto, kiu deziras plene koniĝi kun nia lingvo, ĝia riĉeco, ĝia fleksebleco, ĝiaj preskaŭ senlimaj kapabloj kaj ĝia ĝishod aŭ evoluo.

**Petit Cours primaire d' Esperanto** en 50 leçons graduées, par MM. D. BONNEHON, Inspecteur de l'enseignement primaire, et A. ROSIAUX, instituteur public. 1 ilustrita volumo bindita, in 16, 127 paĝa. *Librejo Hachette et Cie*, 79, boul. Saint Germain, Paris; prezo: Fr. 1,20.—

Jen estas bonega lernolibro tre rekomend-



inda al ĉiuj instruistoj, kiuj celas la sciadon de la lingvo Esperanto, instruante ĝin al iliaj lernantoj.

La nepra neceseco propagandadi nian lingvon en la junularo kaj eĉ en la infanaro instigis la aŭtorojn—kiuj estas spertaj pedagogoj—publikigi kurson jam sukcese de ili antaŭeksperimentitan.

Oni scias la gravecon de la instruado de Esperanto en la infanaj popollernejoj. La lingvo internacia havas praktikan utilecon por la estontaj komercistoj aŭ laboristoj. Ankaŭ, por ĉiuj lernantoj, ĝi estas nekomparebla helpilo, kiu admirinde faciligas la studadon de la patra lingvo; kaj, samtempe, ebligas pli rapidan akiron de fremdaj idiomoj. Fine, ĉar, dank' al la granda fleksebleco de nia lingvo, oni tradukis en Esperanto la ĉefverkojn de diversaj literaturoj, la popolinjanoj facile kaj plezure povas konatiĝi kun la plej famaj aŭtoroj de ĉiuj tempoj kaj landoj.

Sed, ĝis nun, la esperantista gramatikaro, verkita de sciencemaj kleruloj, direktiĝis nur al matura kaj jam instruita lernantaro; kaj ni ankoraŭ ne havis unuagradan lernolibron, simplan, didaktikan kaj plene taŭgan por la instruado de la helplingvo al infanoj.

Tian mankon, la «Petit cours primaire d' Esperanto» feliĉe plenigas. Ĝi konsistas el 50 lecionoj dividitaj en kvin partoj, kun antaŭĉapitro pri «la *prononciation et l' accentuation*.» La unua parto (14 lecionoj) estas dediĉata al «*les terminaisons grammaticales*.»—En la dua (15 lecionoj), la verkintoj donas ĉiujn klarigojn pri «*la composition et la dérivation*» (affixes).—En la tria (9 lecionoj) troviĝas ĉio, kio rilatas al «*les mots simples*.»—La kvara enhavas 6 lecionojn pri «*les participes et la conjugaison*.»—Fine, la 6 lastaj lecionoj, kiuj faras la kvinan parton «*Appendice*» pritraktas diversajn specialajn kaj interesplenajn demandojn.

Tiu ĉi lernolibro, tre zorge ilustrita kaj bindita, enhavas plie multajn ekzercojn (thèmes et versions) bone gradigitajn; legojn; prozaĵojn, versaĵojn parkere dirotajn; 200 kutimajn frazojn kaj proverbojn kun la franca traduko; kaj fine vortaretojn esperantan francan kaj francan esperantan.

Se, laŭ la opinio de Tolstoï, «*la sukceso de Esperanto estas nur pedagogia, lerneja*

*afero*», ni certigas, ke la verketo de Soj Bonnehon kaj Rosiaux, havigante bonegajn rezultatojn al ĉiuj popollernejestroj, donos novan antaŭenpuŝon al la disvastigo de la lingvo internacia en Francujo.

**La question de la langue auxiliaire internationale**, par GUSTAVE GAUTHEROT, D<sup>o</sup> de beletristiko, Prof. ĉe la memstaraj Fakultatoj de Paris. Antaŭparolo de vicadmiralulo BAYLE, 1 vol. in 16, 344-paĝa. *Librejo Hachette et Cie*; prezo: Fr. 3,50.—

Malmultaj demandoj, de post kelkaj jaroj, naskis tiom de polemikoj, kiom la demando pri *Internacia Helpa Lingvo*; malmultaj ankaŭ per tiom da forto sin altrudigis al la atento de tiuj, kiuj komprenas la necesecon de la nova stato, en kiu staras la tuta homaro, precipe en la inteligentaj kaj ekonomiaj medioj, stato kreita de la pli granda disvastigado en la internaciaj rilatoj.

En la momento, kiam la mirindegaj progresoj de Aviado ĵus favoras la interpenetrigon de la popoloj, ŝajnas necese studadi science la nuran rimedon, ekzistantan en la mondo por eviti la ĉiam kreskadantajn malutilojn, kreitajn de la malsameco de la lingvoj: la alpreno de komuna helpa Lingvo.

S<sup>o</sup> Gustave Gautherot ĝin studadis per la ĝustega metodo kaj la grandvaloro de dokumentaro, kiujn li enmetas en siaj historiaj libroj. Cetere lia verko estas, en la plimulta parto, historia libro: en kelkaj ĉapitroj klaraj kaj ĝustaj, li ĉion resumis, kio rilatas al la tute interesinda evolucio de la helpaj lingvoj, karakterizas la esperantistan movadon, kies intensiĝo fariĝos vera eltrovo por multnombraj homoj. Rapida rigardo jetita sur la centojn da referencoj, kaj sur la alfabetan tabelon de la propraj nomoj, sufiĉe montras kiamaniere tiu libro utilos, al kiu ajn deziras trovi kunigitaj la multvalorajn sciigojn, ĝis nun dissemitajn en multnombraj specialaj artikoloj, en revuoj kaj gazetoj.

Tute rimarkinda kaj sciplena verkisto, S<sup>o</sup> Gustave Gautherot skribis ankaŭ verkon de lingvisto kaj sociologo. Li solvis per nediskutebla forto la kontraŭ lirojn, kiuj kutime atakas la L. I.; ekz. oni ofte riproĉis, ke ĝi atencas la disvastigadon de la franca genio kaj lingvo. Kiel certigas Vicadmiralulo Bayle en sia antaŭparolo, neniu rajtos senpripense suspekti ĉu la patriotismon. ĉu la prudenton

de multaj centmiloj da Esperantistoj, kies mirinda lingvo jam ĉe ni akiris la *civitan rajton* apud la publikaj povoj, en la Univerŝitato, en la Maristara instruado kaj en la plej kleraj medioj.

Scienculoj, aferistoj, sportistoj; doktrinuloj, kiuj, en la ardeganta sociala batalado, deziras utiligi la plej potencon ilon de intelekta disvastigado, kiun sendube ĝis nun oni kreis; turistoj, kiuj en fremdaj landoj celas trovi rimedon por interŝanĝi siajn pensojn; ĉiuj legos kun samegala profito la rimarkindan verkon de ni prezentatan al la publiko.

## DIVERSAJ SCIIGOJ

### La ekskurso al Barakaldo.

Manko de tempo por bone aranĝi la preparajn laborojn, devigis prokrasti ĝis **la 6<sup>a</sup> de ĉi tiu monato**, la ekskurson projektitan por la 23<sup>a</sup> de Oktobro. Celante ĉe plej granda nombro da samideanoj partoprenu en ĝi, la organizantoj laboras por ke la manĝoprezento estu plej kiel eble malkara. Ni esperas, ke tiu ekskurso havos tiel grandan sukceson kiel similaj pasintaj festoj atingis. En ĉiuj grupoj de la provinco troviĝas la listoj de partoprenontoj.

### Kursoj de Esperanto.

La Grupo Esperantista de Bilbao malfermis la pasintan monaton, kvar kursojn de Esperanto, tri por viroj kaj unu por virinoj. Juĝante laŭ la nombro da gelernantoj kaj laŭ la entuziasmo kiu ĉe ili regas, nia Entrepreno kolektos bonan frukton post iom da tempo.—Kiel rimarkinda fakto ni citos la kreskantan progreson de nia lingvo sur la virina kampo. Ĉiujare la listoj de niaj Societoj pleniĝas de nomoj de belaj fraŭinoj, avidaj lerni la mirindan lingvon. Ni salutu ilian eniron en nian grandan familion.

**“La Publicidad” de Barcelona, jurnalo** kiu tiom helpis la kvinan kongreson, malfermis ĉiusemajnan *«Esperantan Rubrikon»*, hispane kaj esperante verkita. Ke ĝia ekzemplo estu imitata, jen nia deziro.

**Inter la verkoj kies publikigadon ni** estas devigitaj prokrasti pro malmanko da originalo, estas unu de Fno Jda S. Kurtz, el Vaŝington, alia de Sro B. F. Schubert el sama urbo kaj alia de Sro Gerardo García el

Bilbao. Ni ilin publikigos en la venonta numero.

## VEROJ KAJ MENSOGOJ

Antaŭ kelkaj tagoj industriisto el Caen (Francujo) ricevis rubandon de funebra krono por ke li presu sur ĝin jenajn vortojn: «Ripozu pacel Ĝis revidol»

Du horojn poste la kliento lin telegrafiis: «Volu aldoni *en ĉielo*, se ankoraŭ estas loko.»

La presisto plenumis la peton, kaj la tagon de la enterigo, la akompanantaro povis legi sur la rubando malvolvita:

*Ripozu pacel! Ĝis revido en ĉielo se ankoraŭ estas loko!*

\*\*\*

### MODELA ESTRO

Civitano fama en tempo de la antikva Romo estis Caminius Revidius, kiun oni nomis Konsulo de la Respubliko, sed li nur unu tagon okupis tian postenon.

Al li rilatante diris Cicerono:

—Ni havis tiel fervoran kaj viglan Konsulon, ke li eĉ unu nokton dormis dum sia estrado.

\*\*\*

### FELIĈA DENTO

Edzino: Fine jam falis tiu ĉi dento!

Edzo: Kiel viaj amikinoj envios ĝin!

Edzino: Kial?

Edzo: Ĉar ĝi jam estas liberigita de via lango.

\*\*\*

### ANKORAŬ INTER GEEDZOJ

Ŝ: Tuj! Donu al mi tiun leteron!

Li: Kian leteron?

Ŝ: Tiu, kiun vi ĵus malfermis. Laŭ la skribaĵo de la kovrilo mi vidas, ke ĝi estas virina letero. Do mi volas legi ĝin tuj!

Li: Prenu ĝin... estas fakturo de via vestkaj ĉapel farantino.

Post longedaŭra kaj suferiga malsano, la 30<sup>an</sup> de Oktobro forlasis la vivon la edzino de nia entuziasma samideano kaj Direktoro de NOVA SENTO Sinjoro José Velasco, al kiu ni esprimas nian kondolencon.

Saksa-Turinga. Esp. Ligo, en germ. kaj esp. Eldonejo Wuttke, Magdeburg, 21; jare, Mk. 4.—2,50 Sm.

GRANDA BRITUJO: *The British Esperantist*, oficiala monata organo de B. E. A.: de la Sekretario de la B. E. A., 133 136, High Holborn, London W. C.; jare, ŝ 3 (Fr. 4).—1,50 Sm.

GREKUJO: *Greklingva Esperantisto*, monata organo de «Samosa Esp. Soc.», en greka kaj esperanta lingvoj; ĉe Samosa Esperantista Societo, Samos (Azia Turkolando); jare, Fr. 3.—1,20 Sm.

HINUJO: *Hina Esperanta Revuo*, scienca literatura revuo. Administrejo: S<sup>a</sup> Hoa, 42, rue de Montrouge, Gentilly, Seine (Francujo).

HISPANUJO: *Kataluna Esperantisto*, 12 strato Gracia, Sabadell, Barcelona.

*Iutmonda Espero*, monata ilustr. organo de la Kataluna Esperantistaro, en kataluna kaj. Esp. lingvoj. Adm.: Paradis, 12, pral., Barcelona; jare, Ptoj. 3.—1,20 Sm.

*Gazeto Andaluzia*, mon. org, de la Grupo de Cádiz Adm.: Muñoz Torrero 10.—San Fernando (Cádiz); jare, P. 3,50 (en Hisp. P. 3).—1,40 Sm.

*Semo*, mon. gaz. de Societo Paco kaj Amo, en esperanto; Adm. str. Montseny, 67, 2.<sup>o</sup>, Barcelona; jare (en Hispanuja, Sm. 0,80).—1 Sm.

HOLANDO: *La Holanda Pioniro*, oficiala monata organo de la H. S. E.; Adm.: J. L. Bruin, Kepplerstr. 170. s Hage; jare, Fr. 1 (Holando, Fr. 0,75).—0,83 Sm.

HUNGARUJO: *Hungara Esperantisto*, en hung. kaj esp. lingvoj. Koronahercegu 200, Budapest IV; jare K. 4.—1,70 Sm.

JAPANUJO: *Japana Esperantisto*, monate ilustrita organo de Japana Esp. Asocio, en jap. kaj esp. lingvoj; Marunouchi; Tokio; jare, Fr. 5.—2 Sm.

KROATUJO: *Kroata Esperantisto*, monata organo de «D. H. E.»; ĉe S<sup>ino</sup> Danica de Bedekoviĉ, Zrinjski trg. 16, Zagreb; jare, K. 1,60.—2,30 Sm.

MEKSIKUJO: *Verda Stelo*, monata oficiala organo de C. M. E. Redakcio. 1<sup>a</sup> Aduana Vieja, n<sup>o</sup> 4; adreso: Apartado 2759, Mexico, D. F.; jare, Doll. 1.—2 Sm.

*Esperanta Gazeto*, monata jurnalo, organo de la Okcidenta Esperanta Socio.

Administracio: Calle Morelos 995, Guadalajara; jare.—0,75 Sm.

PERUJO: *Antaŭen Esperantistoj*, en hisp. kaj esp. lingvoj. Redaktoro: Frederico Villreal; Administracio: calle de Tacria, 24, Lima; jare, Fr. 3.—1,20 Sm.

POLUJO: *Pola Esperantisto*, monata organo en pola kaj Esp. lingvoj. Adm.: Hoza n<sup>o</sup> 20, Varsovio; jare, Rb. 2,50.—2,65 Sm.

RUMANUJO: *Rumana Esperantisto*, organo de la «R. E. S.» Administr.: 5, Str. I. C. Bratianu, Bucuresti; jare, Leoj 55 (en Rumanujo 4. L.), (kun Societaniĝo: L. 6).—2 Sm.

*Rumana Gazeto Esperantista*, monata organo de la Unua Rumana Societo Esperantista. Administracio: Strada Coltei 16, Bukaresti; jare, Leoj 3.—1,20 Sm.

RUSUJO: *Ruslanda Esperantisto*, monata organo de rusaj Esperantistoj; ĉefa kontoro: Nevskij 40, loĝ. 25, St. Peterburgo; jare, R. 3 (Fr. 8).—3,20 Sm.

SVISUJO: *Fvisa Espero*, en Esp., oficiala organo de la S. E. E. Administrejo; 6, rue du Vieux College Genevo; jare, Fr. 3.—1,20 Sm.

## NOVA SENTO

ORGANO DE LA VASKA ESPERANTISTARO

### ABONPREZO

POR UNU JARO  
Ptoj S. m

En Hispanujo.. 1,75 0,70  
En Fremdlando 2,25 0,90

### ANONCPREZO

POR UNU NUMERO  
Ptoj S. m

1/2 pago . . . . 10 4  
1/4 » . . . . . 5 2  
1/8 » . . . . . 2,50 1

Malkaraj anoncoj por korespondado, 0,50 Pesetojn (2 spescentojn).

Ni akceptas respondkuponojn kaj ĉiulandajn poŝtmarkojn.

La Redakcia Komitato, reservas al si la rajton korekti, akcepti aŭ malakcepti la manuskriptojn.

*Tiuj ĉi devas esti skribitaj maŝine, aŭ mane, sed ĉiam kiel eble plej klare.*

Diskutoj pri politikaj kaj religiaj aferoj estas malpermesitaj en tiu ĉi jurnalo.

NOVA SENTO estas aĉetebla poekzemplere ĉe la Esperanto-Oficejo, librejo de S-ro Fuentes, Bidebarrieta 9, Bilbao.

# LA REVUO

INTERNACIA MONATA LITERATURA GAZETO

kun la konstanta kunlaborado

DE

**D-ro L. ZAMENHOF**

Ĉe Johano Rosals, 30 Puerta Ferrisa Barcelona, unu numero: Pes. 0,60, jara abonado: Pes. 8.

## Anoncoj

### NOMARO

de Sinjoroj dezirantaj korespondadi kun alilandanoj

La prezo por unu enskribiĝo en tiu ĉi fakto estas 0,50 Pesetoj (2 spescentoj). La literoj P. K. montras la deziron in terŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn; P. M. poŝtmarkojn, kaj L. leterojn.

S-ro. GEO. H. APPLETON.

—LYNCHBURG, Virginia; U. S.

A. deziras korespondadi esperante per kartoj aŭ leteroj. Ĉiam respondos tuj.

S-ro. R. SCHINKEL, MITTVEIDA (Saksujo, Germanujo) deziras interŝanĝadi belajn poŝtkartojn kun ĉiulandanoj, escepte germanoj. Tre baldaŭ respondas.

S-ro. S. Pintado, profesoro, *Bercero* (Valladolid, Hispanujo) deziras interŝanĝi p. m., kaj pensojn aŭ diskutojn pri Pedagogia Historio kaj pri nuntempa instruado kun ĉiulandaj samideanoj ĝeinstruistoj, escepte hispanoj. Li posedas bonegajn fundamentojn pri ĝi kaj ĉiam respondos baldaŭe kaj senerare.

S-ro. J. Gabór, *Budapest* (Hungarujo) VIII Práter u. 16, I. 11 deziras korespondadi per ilustritaj p. k.

## "LA BELGA"

Granda magazeno de enlandaĵ kaj fremdaj murpaperoj

DE

✳ **GUILLERMO PUJOL** ✳

Specialeco je modernistaj desegnoj.

Travideblaj paperoj por vitroj.

STRATO FUEROS (apud Ascao)--BILBAO

SENKONKURENCAJ PREZOJ

# NOVA SENTO



## ESPERANTA GAZETO DE BILBAO

ABONPREZO	ANONCPREZO
POR UNU JARO	POR UNU NUMERO
Pes. P. m.	Pes. P. m.
En Hispanujo.. 1,75 0,70	1/2 pago... 10 4
En Fremdlando 2,25 0,90	1/4 " " " " 5 2
	1/8 " " " " 2,50 1

Laŭ tiu ĉi formato kaj bildo verde aŭ ruĝe kolorigita, ni eldonis poŝtkartojn vendotajn po P-toj 0,40 la dekduon.

Al ĉiu reabonanto ni sendos senpage dekduon da ili, kaj al nova abonanto duonon da dekduo.